V. 1964 2/31 (1962)

Maandblad - voor leden van FLE gratis.
Abonnementsprijs f 3.50 per jaar,
bij vooruitbetaling.

31ste jaargang no. 12 - december 1962

Orgaan
van de Bond van
Arbeiders-
Esperantisten FLE

# Laborista Esperantisto

In het gebied van de Nederlandse taal

Redactie, Administratie en Secretariaat van de Bond van Arbeiders-Esperantisten: Nepveustraat 33II, Amsterdam-West 2, telefoon (0 20) 8 21 77
Penningmeester F.L.E., Wingerdweg 53, Amsterdam-Noord, postgiro 331133 - Boekendienst F.L.E., Marnixstraat 57, Haarlem, postgiro 111278

# JARRAPORTOJ DE LA

## 1a DE OKTOBRO 1961 ĜIS LA 30a DE SEPTEMBRO 1962

### DE LA SEKRETARIO

Kiam ni rerigardas la lastan Asocian jaron, unualoke ĝi impresas al ni kvazaŭ nenio eksterordinara okazis. Tamen, kiuj partoprenis la laborojn, bone scias, ke la laboro ne mankis kaj ke ankaŭ ne necesas plendadi ke ĉiuj penoj estas vanaj. Ke ni esperantistoj volas pli grandpaŝe efektivigi nian idealon ol la realo permesas, estas logike. Eĉ se nenie ni povus montri ian progreson de nia idealo, aliflanke ĉiutage sin altrudas la neceso de internacia lingvo. Radio kaj televido estas inventoj ĝis nun nur duone ĝueblaj ĉar la lingvaj malfacilaĵoj por la granda plimulto kaŭzas, ke por ili ne estas plezuro aŭskulti programon ekster propra lingvo. La feria vojaĝado de multaj milionoj da homoj estas grupe organizita kaj kontakto kun homoj alilande estas minimuma. Tiaj aferoj, kompreneble kun multaj aliaj, personaj sed ankaŭ tute aferecaj, influas bone la propagandon por la internacia lingvo.
Se nia Asocio petas al sindikato movado en Nederlando, proponi por ĝia internacia kongreso la enkondukon de Esperanto, al kio ni ricevis rifuzan respondon, kaj jurnalisto pri tiu kongreso skribas poste ke la lingvaj malfacilaĵoj estis grandaj, ni ne sentas nin venkitaj de la rifuzo. Kontraŭe. La realon eĉ la plej potencaj nur provizore povas nei.
Per rektaj kaj malpli rektaj propagandiloj ni atentigas la publikon pri Esperanto. En oktobro 1961 en niaj sekcioj estis distribuitaj 40.000 skatoletoj da alumetoj. Ili rapide estis venditaj. En marto 1962 sekvis dua kvanto de 32.000 skatoletoj. Ankaŭ ili trovis sian vojon al la publiko. De la artikolo de k-do Alings „Wei een kunsttaal" laŭ mendoj̄n ni represis 4000, de la flugfolio „In eigen land" ni presigis 20.000 ekzemplerojn. Baldaŭ necesis ankoraŭ mendi 10.000. De la kvarfoje en jaro aperante „Esperanto wint veld" ni devis mendi ekstrajn kvantojn.
El nia membraro ni ricevis multajn gazettranĉaĵojn koncerne Esperanton kaj aranĝojn kiujn ni faris, ekzemple nia kongreso en Zwolle.
La dua sekretariino de nia Asocio kolektis ampleksan albumon per tio.

**Radioelsendoj**

Nia prezidanto, F. de Vries, la 14an de julio parolis antaŭ la VARA-mikrofono por memorigi ke antaŭ 75 jaroj aperis la unua lernolibro de Esperanto.
Ni petis permeson en septembro ankoraŭfoje propagandi por niaj kursoj. Tion la programistoj rifuzis, sed promesis elsendi parton de la jubilea kongreso, kiu la 22an kaj 23an de septembro okazis en Haarlem. Efektive okazis, eĉ trifoje. Cetere VARA ĉiusemajne elsendas socialistajn novaĵojn en Esperanto.

**Planoj realigitaj(ataj)**

Laŭ sugesto en la kongreso en Zwolle, la Asocio havigis telefonon al la sekretario. Kvankam ŝajnas simpla afero, ne estis tiel simpla kiel oni supozas. Tamen ĝi funkcias de la komenco de septembro.
Nia gratulkarta agado, per kiu ni volas pli persone atentigi niajn anojn pri la ekzisto de nia Asocio, ankoraŭ ne funkcias. Sed ni klopodas kaj atendas baldaŭan realigon.
Eldono de malmultekosta poŝlibreto, dezirо jam de la Ora Kongreso en 1961, ankoraŭ estas sub manoj, en kunlaboro kun S.A.T.
Peza tasko estis la transloĝiĝo de nia Libro-Servo, parte al Haarlem, parte al Baarn. Pri tio ni jam skribis en antaŭa L.E.

**Kunlaboro kun alaj Esperanto-asocioj en nia regiono**

En N.C.K.E. ni havas regulan kontakton kun la neŭtralaj kaj aliaj Esperanto-asocioj. Tamen ni deziras ke tiu kunlaboro estu pli celtrafa. Apartan raporton oni trovas pri N.C.K.E. kaj la Institucio Esperanto ĉe la Instruado.

**Kunlaboro kun alilandaj laboristaj Esperanto-asocioj**

En la LEA-komitato de S.A.T. okazas skribaj kaj unufoje en jaro persone kontakto dum speciala kunveno en la kadro de la S.A.T.-kongreso. En Vieno reprezentis F.L.E. k-do F. ten Hagen kaj k-dino Kwantes.
Kun la aliĝintaj asocioj ni regule interŝanĝas gazetojn kaj nian Kontaktilon kaj similaj organoj iliaflanke aktuale informas nin reciproke pri la laboroj kaj planoj. Sekretariino de la LEA-komitato estas nia konsilantino k-dino De Weerd.

**La Asocia biblioteko**

Post multaj jaroj de dormado en la kelo, ree eblis aranĝi la librojn kaj eĉ sendi al la sekcioj, distriktoj kaj konsilantoj katalogon pri tiu biblioteko. Ĝi estas parte arĥiva, parte historia, sekve ni pruntedonas nur al funkciuloj aŭ pere de sekcio, por ke ni havu ian garantion ke ne perdiĝu verkoj ne anstataŭigeblaj.

**Kontaktilo**

Nia organo por la funkciuloj, aperis ĉiumonate ĉ. la 15a, por ke ni havu aktualan kontakton kun la aktivuloj en nia Asocio. La celo estas ke la sekretari(in)o traktas ĝin en la sekcio(distrikto) por diskuti kiom povas partopreni la koncerna sekcio aŭ distrikto en la taskoj proponitaj en Kontaktilo. Tial ni ne sendas al ĉiuj funkciuloj. Nun sufiĉas iom pli ol cent, alikaze ni devus ciklostili ĉ. 500.
La Asocia sekretario redaktas kaj cetere pretigas Kontaktilon, kio kostas al li ponumere liberan sabaton aŭ dimanĉon.

**La Asocia estraro**

En nia kongreso en Zwolle eksiĝis la prezidanto, A. G. van Waadenoijen Kernekamp, redaktoro K. G. J. de Jong kaj Libro-Servanto L. J. Spaarenberg. Du gekamaradoj alelektiĝis kaj tiam la estraro konsistis el F. Faulhaber, honora prez.; Foeke de Vries, prez.; F. B. E. ten Hagen, sekr.; V. Oosten, kasisto; k-dino A. H. C. Kwantes-Munnik, Libro-Servo; k-dino A. J. Bakker-ten Hagen, redaktorino L.E.; W. P. Siglé, membro-administrado kaj adresado L.E.; A. M. D. Korff, Inst. Esperanto ĉe la instruado; k-dino H. J. Veen-Naaijkens, 2a sekr-ino. Ni tre ŝatas ke aliĝu kompetenta laborema kamarad(in)o por okupi sin speciale pri la propagando.

**Membro administrado**

La 1an de oktobro 1961a ni nombris
1042 sekciajn anojn
67 ĝeneralajn anojn
en tute 1109 anojn.
Ni havis 58 sekciojn.

La 1an de oktobro 1962a ni nombris
981 sekciajn anojn
69 ĝeneralajn anojn
en tute 1050 anojn.
Ni havas 57 sekciojn.
Malfondiĝis sekcio Zuilen.

★ **Ni deziras al niaj legantoj agrablajn festotagojn !**

La eksiĝoj kaj la aliĝoj estis preskaŭ samaj. Elstare estas la aktiveco de la sekcioj Harlemo kaj Hago. Kvankam ili ankaŭ suferas pro eksiĝoj, tamen tiuj sekcioj ne malprogresis, ĉar ili enskribis sufiĉe da novaj anoj. Ke ni havu pli da tiaj sekcioj. Kelkaj malgrandaj sekcioj malfortiĝis, sed tamen restas vivantaj.
Unu sekcio kunfandiĝis al sekcio en la proksimeco, esperante ke unueco faras fortecon. Sed ho ve, nur la duono aliĝis al la alia sekcio.
Do anstataŭ prospero, perdo por F.L.E.
Ni do ne povas rekomendi ĉi tiun agon. Tre bedaŭrinde estas ke ni perdis kelkajn fidelajn membrojn pro morto.
Cetere la diversaj sekretarioj ankoraŭ erare uzas la kutiman nombron de la kvaronjaro sur la membrolisto, aliaj faras bone kaj uzas la asocian kvaronjaron.
Tio donas malfacilaĵojn en la arĥivo. Estas dezirinde aldoni la komenc- kaj findaton de la kvaronjaro anstataŭ nombri ĝin. Ekzemple la unuan Asocian kvaronjaron oni nomu 1 okt.-31 decembro 1962a.
Ankaŭ estas dezirinde ĉiam aldoni nomon kaj adreson de la sendinto sur la koverto, por ke neniu letero aŭ karto malaperas senbrue.
Dankon al la sekretarioj kiuj kunlaboris por la bona funkciado de la membro-administrado.
Ili estu ekzemplo por la neaktivuloj.

**Simpatiantoj**

Kompare kun la pasinta jaro la s.m. nombro denove montras malkreskon. Ni nun nepre aŭdigu la sonorilon.
Por la nuna jaro ni devas noti la modestan ciferon 700 por simpatiantoj kaj 20 por s.m. organizoj.
Nur kelkaj sekcioj pritraktas la s.m. aferon serioze. La plimulto evidente ne vidas panon per tiu fako.
Ekzemplo. Iu prizorganto pensioniĝis. Subite li ne plu „havas tempon" por enkasigi la monon. Kial ne antaŭe ordigi la laboron kaj reguligi la taskon kun aliulo. Sekvas la perdo de 25 s.m. per unu bato.
Dua ekzemplo. En alia sekcio la „prizorganto" eĉ ne estas membro. Li transloĝiĝis posedante la adresojn de la s.m. kaj neniu scias kien. La sekcio komunikas la perdon de 11 s.m.
Cetere tiuj ekzemploj ne estas stilo konvena al nia movado. Ni agu ĝenerale pli organize.

**„Laborista Esperantisto"**

Ek de la maja numero funkciis nova redaktoro de L.E., pro tio la raporto nur rilatas 5 monatojn de la agadjaro.
Denove punkto de priparolo en la kongreso estis la paĝnombro kaj ree montriĝis ke kelkuloj preferas 8-paĝan L.E. Trifoje en tiu periode aperis eldono enhavanta 8 paĝojn, dufoje 6-paĝa L.E. aperis — konsiderante ankaŭ la financan flankon.
Dum la tuta agadjaro aperis ses 8-paĝaj numeroj kaj ses 6-paĝaj eldonoj.
Danke akceptita estas la enkonduka helpo en la komenca periodo de la veteranoj k-doj Alings kaj Kloek.
Same mi dankas la aliajn kunlaborintojn, la personoj kiuj per artikoloj, ĉu memverkitaj, ĉu tradukitaj, helpas kompili L.E. laŭ plej diversaj gustoj.
Ĉi tie mi petas ke kritiko rilate nian organon ne restu inter vi, sed ke vi skribu ĝin al la respondeculo, aldonante sugestojn pri pli bona irado, por ke ni kune laboru al plej leginda, varia kaj altnivela organo de nia F.L.E.
Ĉijare la aŭgusta numero (samtempe „Esperanto Wint Veld") estis dediĉita al „Esperanto 75-jara", pri kiu temo kelkaj kamaradoj verkis interesajn artikolojn. La timita ne-varieco pro plenigo de tuta gazeto per artikoloj pri la sama temo, montriĝis senbaza.
Apartan dankon ni direktas al la redakcia komitato de la Lingva Rubriko, kiu memstare ĉiun monaton prizorgas la du paĝojn de la nomita rubriko.

**Instrua Servo**

Dum nia lasta agadjaro grava perdo trafis nian Instruan Servon: k-do H. Kuyt, kiu dum jaroj fidele kaj sperte kunlaboris, devis pro privataj kaŭzoj forlasi nin. Ni dankas lin pro lia laboro kaj ni esperas, ke li iam ree trovos eblecon por kunlabori. Anstataŭ li elektiĝis por la prezidanta funkcio k-do Jongeleen, la sekretarian funkcion plenumas k-dino Burgler. Kiel kasisto-administranto laboras k-do Lamfers.
*En la elementa kurso partoprenis 39 personoj,* el kiuj kelkaj aniĝis al nia Asocio.
*Por la elementa diplomo (A) studis 7 kursanoj.*
*Por la M-diplomo studis 12 kursanoj,* bedaŭrinde mankas al ni la ciferoj por kontrorli, ĉu ili ĉiuj partoprenis en la ekzamenoj kaj ĉu ili sukcesis. Tamen en la sekvontaj jaroj ni esperas sciigi ankaŭ pri ĉi afero statistikon.
*La korektan laboron faris por la elementa kurso:* gek-doj Rijpstra-Timmermans, H. Beijne, N. J. van Dijk, A. Henstra, H. Hoen, F. C. Kokken, A. J. v. Kouwen, D. de Raaf, J. de Ruijter, K. v. d. Schulp, J. Frielink.
*Por la E-kurso:* gek-doj A. Obbes, C. C. M. Rijpstra-Timmermans, F. C. Kokken, P. Lamfers, J. de Ruijter, A. v. d. Starre.
*Por la M-kurso:* gek-doj A. Obbes, A. J. Bachofner, P. Lamfers, C. F. Kokken, A. v. d. Starre.
Ni kore dankas ĉiujn kunlaborantojn kaj ni esperas, ke ili ankaŭ dum la sekvontaj jaroj bonvolos daŭrigi ĉi laboron.
Dum la lasta agadjaro denove sukcesis al ni amortizi sufiĉe gravan sumon el nia ŝuldo ĉe la Asocia Estraro, ni esperas baldaŭ la tutan ŝuldon malaperigi.

E. Burgler.

Kun bedaŭro ni devas mencii la morton de nia fidela k-do A. v. d. Starre; la morto malebligis al ni lin persone danki pro la multa laboro, kiun li faris por nia Servo.

E. B.

**N.C.K.E.**

En la jarkunveno je 24-2-1962 reelektiĝis kiel kasisto kaj sekretario respektive J. Pouli kaj A. M. D. Korff. Mankis kandidato por la funkcio de pezidanto sed K.U.N.E. promesis baldaŭeble kandidatigi iun. K.U.N.E. plenumis tiun promeson per la kandidatigo de sinjoro J. D. Brakel. Pro malsano tamen sinjoro Brakel nur dum kelkaj monatoj povis plenumi sian funkcion kaj lin anstataŭis lia samsocietano, sinjoro W. Krikke.
Malgraŭ tiuj ĉi malfacilaĵoj ĉirkaŭ la funkcio de prezidanto, N.C.K.E. laŭeble eluzis la ĉijaran jubileon de Esperanto: la fakto, ke antaŭ 75 jaroj aperis la unua lernolibro de Esperanto. Dum la monato septembro 4 poŝtdistriktoj (Amsterdam, Rotterdam, Den Haag kaj Haarlem) uzis specialan poŝtstampon kun la teksto: „Esperanto: 75 jaar internationale taal", per kiu miloj kaj miloj da poŝtaĵoj estis stampitaj. Kvankam tiu formo de propagando certe ne estas malmultekosta, estas konsiderinde se eble ĉiujare en septembro tiel propagandi. La 4 poŝtstampiloj kostis entute f 360,—.
Elstara, ankaŭ el propaganda vidpunkto, sendube estis la jubilea kongreso en Haarlem, kiun partoprenis proksimume 300 personoj. La samtempa ekspozicio, prizorgita de la haarlema kunlaborkomitato, altirus grandan aron da interesiĝantoj. Ankaŭ la koncerton, en la kadro de la jubilea kongreso, vizitis nombro da ne-esperantistoj. La loka kaj landa gazetaro raportis pri ĝi, kvankam ne grandskale. Escepto estas la loka anoncgazeto „De Echo", kiu per esperantlingva kaj nederlandlingva artikoloj sur preskaŭ tuta frontpaĝo bonvenigis la kongresanojn.
La Gazetservo funkciis kontentige. Ĉiumonate aperis la kutima bulteno, kelkfoje kun specialaj kaj detalaj aldonoj okaze de la 75-jara jubileo de Esperanto. Speciale tiujn artikolojn ni renkontis en multaj gazetoj! Nia membro H. Suurmans el Haarlem prizorgis la adresigadon kaj ekspedon de la bultenoj kaj per tiu kunlaboro grave plifaciligis mian taskon.
Resume ni povas konkludi, ke N.C.K.E. kapablas efike plenumi gravan taskon: la ĝenerala propangandon por Esperanto, se ĝi nur disponas pri la financaj rimedoj.
Ĉar en la jarkunveno montriĝis la deziro kelkloke ŝanĝi la regularon de N.C.K.E. mi kaptis la okazon projekti tute novan regularon, kiu eliras de tuta nova formo de kunlaboro, nome la starigo de Federacio de Nederlandaj Esperanto-asocioj. Estas mia espero, ke tiu federacio en la nova laborjaro povu esti starigita, favore al nia komuna afero: la disvastigo de Esperanto.

A. M. D. Korff, sekretario.

**Institucio „Esperanto ĉe la Instruado"**

Ankaŭ en 1962 la estraro de la Institucio „Esperanto ĉe la Instruado" daŭrigis siajn klopodojn pli fortigi la pozicion de la Institucio.
Por havigi pli da influo ĉe oficialaj personoj kaj instancoj ĝi formis „Raad van Advies", kiu konsistas el: prof. dr. C. C. Berg, dr. W. Drees, prof. dr. Jos J. Gielen, dr. J. W. van Hulst, C. Kleywegt, prof. dr. J. Prins, jhr. mr. C. J. A. de Ranitz, mr. A. B. Roosjen, mr. K. T. M. van Rijckevorsel. Ĉar la enkonduko de Esperanto en mezaj lernejoj alportas specialajn problemojn estis fondita speciala komisiono por solvi tiujn. La komisiono konsistas el: dra C. M. Burger, dr. J. M. van Buijtenen, drs F. v. d. Oudeweetering, dr. C. van Rijsinge, prof dr. G. Stuiveling kaj prof. dr. C. F. P. Stutterheim. Kiel prezidanto kaj sekretario de la komisiono funkcias respektive mr. F. Winkel, direktoro de la Institucio, kaj ir. H. Bakker, estrarano de la Institucio.
La estraro planis specialan kampanjon por informi la geinstruistaron pri la eblecoj de Esperanto. Tiucele ĝi okazigis informajn kunvenojn en Den Haag (15-6-1962), Amsterdam (26-9-1962). La sekvonta kunveno okazos en Utrecht je 28-11-1962. Ĝojige estas, ke la komunumaj estraroj de Den Haag kaj Amsterdam donis gravan subvencion en la kostoj de tiuj vesperoj. Alia informa kunveno por geinstruistoj okazis en Vlaardingen (15-10-1962). Laŭ peto de nia estraro la skabeno de Instruado, sinjoro Minnen, kunvokis la geinstruistojn por aŭskulti prelegojn de dra C. M. Burger kaj mr. F. Winkel.
Por interesigi ankaŭ la gelernantojn de la t.n. „Kweekscholen" por instruistoj, la estraro okazigis prelegvojaĝon de prof. dr. I. Lapenna. Pro tempomanko sinjoro

# Abraham van der Starre

**21 junio 1890**

**15 novembro 1962**

Denove unu el la plej agemaj pioniroj de nia Esperanto-movado forŝiriĝis el la tutmonda armeo de tiuj homoj, kiuj jam partoprenis en la por-Esperanto-batalo en la plej frua tempo de ĝia apero. Li restadis ĝia fidela adepto ĝis sia lasta vivomomento.
Nur dezirante memorigi ĉiloke ĉion, kion nia kamarado v. d. Starre faris por nia komuna idealo, ni spertus ke „Laborista Esperantisto" estus tro malgranda. Jam en 1909 li eklernis Esperanton. Tute laŭfakte ni povas diri, eĉ ne unu tago forpasis depost tiam, en kiu li ne ĉiel pretis akceli „la aferon". Alude ni do nur diru: Li estadis la direktanto-gvidanto en sia loĝurbo IJmuiden; seninterrompe gvidis Esp. kursojn; plenumis senprecedence ĉiajn funkciojn en la N.H. Distrikto; boncele aktivis jarojn kiel konsilanto (tre altŝatata!) de nia Asocia Estraro; asistis en kompilado de „Ni Kantu!" kaj krome li trovis tempon partopreni en multaj S.A.T.-kongresoj, Bellamy-movado k.t.p.
Amiko v. d. Starre.... tutordinara filo de modestaj gepatroj-laboristoj.... tamen el pura sento de kamaradeco kaj elkora amikeco ĉe lia impona kremacio, sen iu ajn alvoko kolektiĝis pli ol 125 pacaj batalantoj — kiuj cetere reprezentis plurmilojn da esperantistoj, ne nur el Nederlando, sed el la tuta mondo! Ho miraklo de Esperanto, lingvo kiu embriigas feliĉon al ĉiu adepto (sen iu escepto!) kaj per forigo de la analfabetismo interpopola alcelas kaj pli realigos unuiĝon de l'disdividitaj popoloj.
Nome de tiu granda amaso da tutsinceraj geamikoj-kunbatalintoj, solene, celebre sed elokvente kaj elanime adiaŭ-parolis kelkaj reprezentantoj el al verda armeo en la jena sinsekvo:
Unue k-do Fauhaber en la nomo de nia „Asocio de Laboristaj Esperantistoj", kiu i.a. tre prave atentigis pri la specifa karaktereco de nia simpatia v. d. Starre: pri lia elanima kapablo harmoniigi la, inter si plej kontraŭajn opiniojn; k-do De Greef nome de la Esp. Distrikto Utrecht; k-do Schoon kiel persona amiko kaj nome de la N.H. Distrikto, kun speciala atentigo pro la grupo IJmuiden; k-do Van Essen kiel reprezentanto de S.A.T. Li precipe laŭdis la mortinton pro lia fidela vivodaŭra kunirado sur la vojo junule elektita; kaj nepre ni ne forgesu nomi le ne-esperantistan amikon, kiu kortuŝate kaj -tuŝante adiaŭis sian fidelan amikon, kun kiu li jam interkonatiĝis antaŭ proksimume 60 jaroj.
Refoje unu el la ĉiam helpopretaj, ŝatataj verdsteluloj poreterne malaperis kaj la vaka loko ne facile okupiĝos. Li kiu tiel vigligis ĉiajn niajn kunestadojn kiel gaja „kantoro", paroladanto, k.t.p., estinteco.
Sed liaj vivo kaj strebado certe ne vanis! La fruktoj de lia senlaca semado ekkreskos, floros kaj, maturiĝinte, donos riĉan rikolton ĝis en la periferioj de nia globo. Se la ununura efiko de la Zamenhofa lingvo estus nur la prerogativo povi konatiĝi kun homo, kia „Bram" v. d. Starre, ĝia genia kompilinto jam meritus ĉies danko-konfeson! Liaj gefiloj fieradu pri li! Ni neŝanĝiĝeme daŭrigu la vojon elektitan.

I. Schoon.

## Fondaĵo Vojaĝoficejo „La Libera Mondo"

De suprenomita fondaĵo nia Asocio estas unu el la fondintoj, kune kun diversaj laboristaj asocioj en Nederlando.
La fondintoj rajtas ĉeesti la jarkunvenon kaj ĝenerale dirite formas la plivastan estraron de la fondaĵo. Tial ni ricevis inviton ĉeesti konferencon de vojaĝgvidintoj ktp., en Troelstra-oord, Beekbergen, la 24an kaj 25an de novembro. Partoprenis estroj de la konstantaj feriodomoj, vojaĝgvidintoj, estraro ktp., parte kun edzinoj, entute ĉ. 200 personoj.
Sabatvespere post la vespermanĝo la prezidanto Vermeer malfermis la kunvenon kaj skizis la kreskon de la fondaĵo. Poste parolis s-roj Blijdenstijn pri „Kion atendas la partoprenanto de vojaĝgvidanto", De Coole pri „La organizaĵo de la Libera Mondo", d-ro De Vrankrijker pri „Turistaj perspektivoj". Sekvis okazo prezenti demandojn laŭ la enkondukoj. De la 22a horo ĝis 24a estis t.n. borso por vojaĝgvidintoj, t.e. interŝanĝo de spertoj.
Dimanĉmatene iu distribuis „Esperanto wint Veld" kaj konstatis samtempe ke estas multaj kiuj iam lernis Esperanton, almenaŭ sufiĉe por diri en ĝi kelkajn vortojn.
Post la panmanĝo en la kunveno la parolintoj respondis la demandojn de la antaŭa vespero. La direktoro Tj. Tjebbes prezentis la vojaĝprogramon por 1963. Lunĉo kaj pretigo por foriro finis la programon.
Kiom utilas al nia Asocio? Unue: se ni povas liveri vojaĝgvidantojn, tiuj povas demonstracii la utilon de Esperanto. Necesas por tio scii la lingvon de la lando al kiu oni sin prezentas por gvidi grupon, ekz. germanan lingvon, francan, italan, ivrit (hebrean). Se unu el la parolantoj diras, ke en francio abundas spaco por feriantoj sed timas la publiko lingvomalfacilaĵojn, ni klopodu helpi tie. Nia Asocio jam kontaktigis Liberan Mondon kun la esperantista feriejo kastelo Grésillon. Ĉu nia perado portos fruktojn, ni atendu.
Unu el niaj anoj, k-do A. Reuderink el Arnhem, jam kelkajn jarojn estras por Libera Mondo feridomon en Aŭstrio, kvar monatojn ĉiusomere. Kiuj sentas sin kapablaj funkcii kiel domestro aŭ vojaĝgvidanto, skribu al „De Vrije Wereld", Kloveniersburgwal 103, Amsterdam-C.
Eksterlandaj entreprenoj kiuj volas kontakti kun Libera Mondo, eventuale povas fari tion pere de nia Asocio, Nepveustraat 33, Amsterdam-W.




*Gedurende de gehele maand september werd in de postdistricten Amsterdam, Den Haag, Haarlem en Rotterdam dit speciale poststempel gebruikt.*
*Het initiatief hiertoe ging uit van NCKE. het Centraal Comité van de Esperanto-beweging in Nederland.*

**„Fonds voor Catalonië"**

Eerste verantwoording:

| | |
|---|---|
| I. Schoon, Haarlem | ƒ 5,— |
| J. Visser, Maassluis | ƒ 20,— |
| Totaal op 28 november | ƒ 25,— |

I. Schoon,
Ooievaarstraat 9, Haarlem

## Kongres P. v. d. A. en Esperanto

Dat ons lid Winkel, in Schagen, ons berichtte in zijn afdeling een voorstel over het talenprobleem in te dienen, deed ons vanzelfsprekend genoegen.
Wij kregen nu door bevriende hand de voorstellen ter inzage voor het a.s. P.v.d.A. kongres, dat 17, 18 en 19 januari in de Dierentuin te 's-Gravenhage wordt gehouden.
Daar lazen we, voorstel 19, Schagen: Het congres besluit een commissie te benoemen, die zal onderzoeken welk idioom het best geschikt is om als Europese taal dienst te doen.
Voorstel 89, Huizum: Het congres is van mening, dat aan bezitters van de onderwijsakte Esperanto eenzelfde toelage moet worden gegeven als voor het bezit van andere taalakten wordt genoten, en nodigt de kamerfracties uit het nodige te doen voor de effectuering hiervan.
Voorstel 90, Dordrecht, Huizen en Noorddijk: Het congres dringt er op aan te bevorderen dat het Esperanto wordt ingevoerd voor de internationale contacten en dat deze taal op de scholen als leervak wordt ingevoerd.
Wij wensen onze leden in de P.v.d.A. veel succes en wekken allen op, die in de gelegenheid zijn, een steentje daartoe bij te dragen.

## Esperanto-examens 1962

Geslaagd: 2 S-, 16 M- en 33 E-candidaten.

*Geslaagd voor examen S:*

E. A. Otto, Den Haag; N. J. van Ieperen-de Vries, Utrecht.

*Geslaagd voor examen M:*

N. I. W. Vetter-Boot, Amsterdam; N. C. Kuiterman-van Goor, G. Waterbolk, Groningen; W. M. ter Reehorst, E. E. Swaneveld-Krikke, J. C. Diependaal, H. Valkenburg, R. K. Hanse, P. A. Okma, Den Haag; A. Luyten, Krimpen a. d. IJssel; C. v. d. Vlies, W. A. Snijder, F. W. K. Coumou, L. van Duijn, Rotterdam; H. van Dalen, Rijswijk; W. F. Pilger, Zaandam.

*Geslaagd voor examen E:*

G. J. Rodenhuis-Bol, W. Rodenhuis, Aerdenhout; A. Bruggink, Apeldoorn; G. Broekema, C. C. Dorré-van Kuik, M. A. T. Neerincx, Arnhem; M. J. Mol, Blokker; R. M. B. Koopmans, Didam; J. J. Snoek, Groningen; M. K. van den Berg, W. B. F. Blomme, C. Bal, Den Haag; G. Goedejohan-Molenbroek, F. Smit, J. Strijbis, A. E. Moerbeek-Prins, R. Beck-Polak, M. E. van Buuren-de Vries, H. Valkenburg-Polak, Haarlem; A. N. Bothof-v. d. Meer, Heemstede; C. Lussenburg, M. Bokhorst, B. W. Hessels, H. Bouman, P. E. v. d. Werff-Geldmaker, A. Kenbeek, H. J. v. d. Heyden, Rotterdam; E. Wijnands, Soesterberg; C. A. Verdouw, T. A. Wolters, J. C. van Blijderveen, F. A. Brandt, Zeist; S. P. Smits, Zoetermeer.

# ESTRARAJ KOMUNIKOJ

La abonantoj estas petataj pagi la abonmonon por 1963a.
Pro nepago de la abonmono de niaj Belgaj abonantoj, ni haltigos la sendadon ek de la januara numero.
Se vi deziras daŭran abonon, vi pagu **nun** por 1962a kaj 1963a.

10 november ontvingen wij van k-do R. v. d. Outenaar uit Haarlem f 20,— van verkoop gebruikte postzegels.
In het geheel hebben wij reeds f 160,— ontvangen, waarvoor onze hartelijke dank. Tevens sporen wij een ieder aan gebruikte postzegels te verzamelen en op te zenden aan k-do R. v. d. Outenaar, Merkmanstraat 5 te Haarlem.
De ontvangen bedragen vinden hun bestemming in het Faulhaber-fonduso.

## *El la sekcioj* ★

LEEUWARDEN,
Verstolkstraat 10.

La 8an de novembro ni jarkunvenis ĉe k-do Kruizenga, P. C. Hooftstraat 69.
La jarraportoj de la sekretariino kaj kasisto estis aprobitaj.
Nia propagando: en oktobro 1961 ni presigis en Leeuwarder Courant kaj Het Vrije Volk grandajn anoncojn pri la skriba kurso de la Asocio. La rezulto estis 5 kursanoj, el kiuj 4 aliĝis. En septembro 1962 ni denove enpresigis en tiuj ĵurnaloj grandajn anoncojn. La rezulto estis 2 gekursanoj.
Plue ni disdonis inter la geanoj de N.I.V.O.N. 500 ekzemplerojn de la malgranda flugfolio kaj inter la membroj de Algemene Bond van Ambtenaren 2000.
*Dum 4 semajnoj,* (post nia peto) en la butika fenestro de „Arbeiderspers" estis ekspozicio de la plej novaj esperantaj libroj, la parolado de D-ro Drees, Esperanto wint Veld, Laborista Esperantisto, k.t.p. Granda portreto de D-ro Zamenhof, pentrita de nia kasisto D. Blanksma, kaj nia flago, tiris la atenton.
La butiko troviĝas je „Nieuwstad" la plej granda butikcentro de nia urbo. En nia anonco en Het Vrije Volk ni sciigis ke ankaŭ en la butiko de „Arbeiderspers" oni volis doni informojn pri la kurso. *Ni dankas sinjoron v. d. Zwaard,* la butikestron, por liaj helpo kaj servoj.
Ni nun disigas 600 ekzemplerojn de la flugfolio inter la membroj de Ned. Bond voor arb. in het Vervoerwezen, kaj nia prezidanto parolos en kunveno de „Vakbondsjeugd".

C. C. M. Rijpstra-Timmermans

## *El la distriktoj* ★

NORD-HOLANDO
Spaarnoogstraat 29, Haarlem

**Semajnfino Wijk aan Zee**

Jen lasta atentigo pri la semajnfino la 15a kaj 16an ĉi-monate. Ĉiujn detalojn vi povas trovi en la oktobra numero de L.E.

**Uzitaj poŝtmarkoj**

K-do A. v. d. Outenaar denove sendis sumon al la Asocia Estraro. (Vidu ankaŭ Estr. Kom., red.) Al ĉiuj kiuj helpis v. d. Outenaar, koran dankon!
Deziras al vi la tuta estraro agrablajn festotagojn!

G. J. van Wonderen, sekr-io

# Antverpeno

Kiam mi volas paroli pri granda urbo ne eviteble mi devas pensi pri larĝaj bulvardoj, riĉaj muzeoj, imponaj konstruaĵoj kaj aliaj objektoj prezentitaj per elokventaj adjektivoj.
Tio tamen ne okazas al mi kiam temas pri Antverpeno. Tiu ĉi urbo, same kiel ĉiuj aliaj, posedas identajn trezorojn. Sed la nomo, Antverpeno, ĉiam memorigas pri haveno kiu ege suferis pro la bombardado per flugantaj- kaj raketbomboj dum la lastaj monatoj de la milito. Tiu bombardado kaŭzis la morton de miloj da personoj kaj la detruon de granda nombro da domoj kaj diversspecaj instalaĵoj. Tamen la aktiveco seninterrompe funkciis kaj multege helpis por havigi al la liberigaj armeoj la necesan provianton kaj municion.
La historio de la urbo fariĝas iom klara nur ekde la 12a jarcento. Bone situanta sur la dekstra flanko de la rivero „Skeldo", la urbo rapide disvastiĝis kaj fariĝis grava industria centro. Por la ŝipoj, la aliro estis tre facila ĉar la albordiĝo, senpere de kluzoj, rekte okazis ĉe la skeldobordo kaj en kanaletoj. La konstanta kreskado de la urbo kaj haveno poste necesigis la konstruadon de dokoj kaj basenoj. Sekvis la fosado de sekaj dokoj kaj konstruo de ŝipriparejoj. La ĉiuspeca ilaro konstante devis esti renovigata kaj modernigata. Ŝipoj el ĉiuj mondpartoj alportas varojn kaj krudajn materialojn kaj foriras plenaj je prilaboritaj objektoj.
La diversaj komerc- kaj industriaj instalaĵoj estas memkompreneble multnombre vizitataj de turistoj kaj interesuloj.
Krom la haveno la urbo mem prezentas evidente multajn vizitindajn vidindaĵojn. Mi citas i.a. la muzeojn, la subskeldajn tunelojn, zoologian ĝardenon, la sennombrajn monumentojn, preĝejojn kaj malnovajn domojn.
Siaflanke, la urbestraro ne malfavoras Esperanton. Antaŭ kelkaj jaroj Zamenhofstrato estis inaŭgurita. La urba turisma oficejo disdonis jam plurajn libretojn kaj faldfoliojn esperantlingve kaj la ĉefbiblioteko havas gravan stokon da esperantaj libroj.
En la ĉirkaŭaĵo de la urbo, spacaj kaj ĉarmaj parkoj beligas la novajn kvartalojn, novaj kaj altegaj domoj, kvazaŭ kreskas el la fekunda tero.
La popolo estas tre laborema kaj la urbo havas gastaman reputacion.
La laboristaj esperantistoj atendas vin multnombre.

S. Mortiers

**Kiu povas helpi?**

Korespondi estas, por mi, la plej ŝatata maniero uzi Esperanton. Mi vere ŝatas leterojn, ĉar laŭ mi, leteroj estas la plej bonaj ambasadoroj por fondi fratecon en la vera senco de la vorto. Jam longe mi korespondas regule pri diversaj temoj, sed momente la reguleco endanĝeriĝas. Korespondtemo i.a. estas „nacia kostumo" sed bedaŭrinde mi havas grandan penon havigi al mi bildkartojn montrantajn la regionajn kaj lokajn kostumojn.
Mi petas al ĉiuj kiuj volas helpi min: bonvolu sendi al mi bildkarton montrantan nacian kostumon (ambaŭ sekse) el via regiono aŭ loko. Anticipe mian dankon!

L. C. v. d. Meer,
Goeman Borgesiuslaan 83, Schiedam



**F.L.E.-kongreso, Antverpeno**

**la 30-an kaj 31-an de marto 1963.**

Kongresejo: Algem. Centrale Bouw Hout, van Arteveldestraat 17, Antverpeno
Prezidanto: E. Willekens.
Sekretario: Jos. Bonte, De Francqueslei 8, Deurne.
Kasisto: John. Bovoy, Minderbroedersrui 60, Antverpeno.
Poŝtĉekkonto: 273038.
Detaloj en sekvonta L.E.
Aliĝoj antaŭ 1-3-1963a.

## *S.A.T.-rondoj* ★

AMSTERDAMO
Curiestraat 22 hs

Grava invito! Je la 6a de januaro 1963 en nia kutima ejo „De Leeuw", Valkenburgerstr. 149 rakontos por ni s-ro J. L. Mast pri siaj travivaĵoj dum siaj eksterlandaj vojaĝoj, speciale: Ruslando! Ni prezentos lumbildojn per epidiaskopo.
Ni kunvenos en salono E (mallumigebla). Komenciĝo je la 10.00a horo. Kiu malfruas mem kulpas ne havi sid-lokon!

**Kotizoj**

Ek de la 1a januaro 1963 validas jenaj kotizoj por la anoj de la Amsterdama SAT-Rondo:
membreco kun Senn. kaj jarlibro f 8,25;
membreco por samfamilianoj f 4,50;
membreco por geedza paro f 12,75;
Sennacieca Revuo f 2,15.

D. Veen.

ROTERDAMO
Aegidiusstr. 13a

La lastan fojon por la jaro 1962, ni alvokas vin veni al nia SAT-ronda kunveno.
Ĝi okazos la 30an de decembro je la 10.30 horo en Strijensestr. 65.
Por ni tiam parolos: k-do W. Geurtz. La temo: „Ĉu vere regas bonfarto?"
Al tiuj kiuj nepre ne povos veni, ni deziras agrablajn kristnasktagojn kaj bonan jarŝanciĝon! Al la aliaj ĝis la revido!

sekr. M. Bout-v. Veen